nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2025

## LIBRO-PREZENTADO EN LA SIDEJO



La 6-an de majo oni finfine povis okazigi la libro-prezentadon de la romano de nia itala samideana arabisto, Viviana, "Serendipeco", eldonita dulingve itale kaj esperante, sub pseŭdonimo Stasia Chylicki, kiu rilatas sperton duonmembiografian, pri familia malkovro kaj renkonto, en kiu la internacia lingvo rolis. La ĉeestantoj montris grandan intereson.

## REGISTRAĴO DE LA TAGO DE LA LIBRO

Jam troviĝas en la reto la filmo de sinsekva legado de Don Quijote en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes, kiun partoprenis du junaj samideanoj, Irene kaj Adam, legante sufiĉe longan pecon en Esperanto (la tutan ĉapitron 7 de la unua parto). Oni povas ĝin trovi en la adreso: https://www.youtube.com/watch?v=fkjGSUVOIag (ĉ. 1 h 35 m)

## REGISTRAĴOJ DE LA PASINTA HISPANA E-KONGRESO

Tre sukcesa montriĝis la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu, kiel sciite, okazis en Sorio en la feriponto de la festo de la laboro, kaj al kiu aliĝis pli ol 150 esperantistoj, kun intensa partopreno de madridanoj, ĉu kiel organizantoj, prelegantoj aŭ ĉeestantoj.

Se vi ne povis ĉeesti, Hispana Esperanto-Federacio publikigas nun sinsekve tre kompletan aron da registraĵoj de diversaj programeroj, inklude de muziko, prelegoj, poemlegadoj, ktp. Vizitu ĝian kanalon: https://www.youtube.com/esesperanto.

La venonta kongreso okazos en julio 2026 en la urbo Portugalete, apud Bilbao.



## INTERNACIAJ KONGRESOJ DUM LA TUTA SOMERO

Multaj Esperanto-renkontiĝoj estas antaŭvidataj por la venontaj monatoj, je loka, landa aŭ internacia skalo.

La plej grava estos la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ĉeĥa urbo Brno (aŭ Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Aliĝis ĝis nun preskaŭ 1000 homoj, el kiuj preskaŭ 30 el Hispanio inklude de kelkaj madridanoj. Vi povas aliri ĉiujn detalojn en tiu ĉi ligilo. https://uk.esperanto.net/2025/.




Preskaŭ 150 homoj aliĝis jam al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu okazos en Cisarua (Indonezio) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025. Indonezio estas perfekta loko por pasigi someran ferion, kun mirindaj pejzaĝoj, kultura diverseco, kaj riĉa sperto kun samideanoj tra la tuta mondo. Krome, TEJO malfermis fonduson "Partoprenu IJK-n" por ebligi la amasan partoprenon de aziaj kaj oceaniaj junuloj en la evento, al kiu ĉiu povas kontribui. Ĉiujn detalojn trovu ĉe: https://ijk2025.tejo.org/.

La Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Beogrado (Serbio) inter la 19-a kaj 26-a de julio, dum Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigos sian kongreson ĉijaran en Francio, en la kastelo Greziljono inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

Krome, okazos multaj aliaj renkontoj. Nur kiel ekzemplo, la Interasocia kongreso de Esperanto en Francio okazos en Nantes, tre baldaŭ, de la 7-a ĝis la 9-a de junio. Kaj la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59) okazos de la 5a ĝis la 13a de julio en Kaŭno (Litovio).

## VIZITOS NIN

De la 5a ĝis la 12a junio venos en Madridon paro de usonanoj, el kiuj li estas esperantisto. Temas pri Alex Mikishev, 64-jara esperantisto el Teksaso (Hjustono). Se iu el vi povus ĉiĉeroni ilin en tiuj datoj, bv skribi al la adreso de Liceo por koni ilian kontaktadreson.

## PROGRAMITAJ RENKONTIĜOJ

La unuasabata kunveno okazos la 7-an de junio, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo.

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

## PLIAJ LOKOJ POR INFORMIĜI

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: https://x.com/LiceoMadrida. Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com